

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2014



**100 jaroj Tove Jansson,
Muminlibro, p. 4**

Mumin-figuroj, p. 14

Aŭtunaj Tagoj – Syyspäivät 6.–7.9.2014, p. 10-13

- ♦ Lingvaj eroj kolektitaj dum vivolonga itinero, p. 5
- ♦ Literatura konkurso, p. 6

♦ Somera Esperantokurso alproksimiĝas, p. 8 ♦ Trastui, p. 13

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanjapa.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 24 EUR/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300

Kansi/Pärm/Kovrile: Muminfiguroj. Foto: Saliko

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com

Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ arja.kuhanen@netti.fi

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi

Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Tuomas Latva-Pirilä, Ratakatu 6 as. 12, 96100 Rovaniemi. ☎ 0400 702 816 ✉ tuomas.latva-pirila@suomi24.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Danske Bank 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Ni fosu nian sulkon, interkompreniĝon



En la retlisto de Komitato de UEA aperis 11.11.2013 sciigo sendita de Eŭheno Kovtonjuk: *”Estimatej samideanoj, post longaj penoj en Ukrainio aperis sola strato Esperanto.*

Laŭ decido de distriktaj aŭtoritatoj en Krimeo la 21-an de aŭgusto nova strato kiu direktas al la Nigra maro estis nomita Esperanto. Sur la strato Esperanto numero 1 situas ĉemara ripozejo ‘Espero’ (rg. fotoĵon), kie estas lanĉita e-arkivo.”

La maro tute ne estas nigra, sed blua ĉe tiu urbo Tarhankut en okcidenta Krimeo. Tiu foto kaj kelkaj aliaj estas retroveblaj en la repaĝo de internacia junulara renkontiĝo ”Espero-2017” okazonta en la unuaj dek tagoj de proksima julio. Publikigita listo de aliĝintoj nombras 26 spertulojn kaj komencantojn, gejunulojn kaj kreskintojn, Ukrainianojn kaj Ruslandanojn. Unua aliĝo estas datita 3.4., dume lasta 29.5.

Espero de niaj Ukrainiaj samideanoj emas inviti Universalan Kongreson en tiu menciita jaro, kaj la ĉe-Nigramara renkontiĝo celas trejni kaj preparigi por tio. Laŭ iuj historiaj donitaĵoj, oni en Kievo planis inviti la UK en 1917. Bele estus tiel montri, ke la mondo sukcesis sin progresigi en cent jaroj. Antaŭ ĝuste jarcento, Zamenhof unuan kaj solan fojon vizitis Finnlandon, tute ne agrabla vojaĝo; survoje al la 10-a UK en Parizo, li estis haltigita en Kolonjo kaj devigita reveturi tra la neŭtralaj Danio kaj Svedio al la car-regna Finnlando, longa norda ĉirkaŭvojo.

La 67-a Internacia Junulara Kongreso okazis en 2011 en Kievo, dum la UK gastis en Kopenhago. Unu el la tiamaj aktivuloj, Mikaelo Lineckij, aranĝas somermezan semajnon kun kaj por eks-Kievano nun loĝanta en la al ni proksima Tiĥvin, konata de multaj el ni: Verkisto kaj muzikisto Mikaelo Bronŝtejn festas siajn 65 jarojn kaj invitas al eta kulturfestivalo.

La Ukrainiaj kaj Ruslandaj esperantistoj troviĝas en malfacila situacio. Ne unuj rilate al aliaj, sed rila-

te al siaj ŝtatoj. La pasinta duonjaro estis periodo de tiaj kaj tiel subitaj ŝanĝoj, ke malfacile estas teni la Zamenhofan penson klara inter ĉie agre-santa nacionalisma propagando por tiu aŭ alia partio. La lando estas en reala danĝero de longdaŭra interna konflikto akcelata de diversflankaj eksteraj fortoj. Ĝia disvastiĝo estus vojo de Jugoslavio, Sirio, Egipto – utila al nur tiuj, kiuj gajnas el detrua industrio.

Des pli laŭdinde, ke lokaj esperantistoj, ankaŭ en Krimeo, daŭrigas sian laboron. Ni esperu, ke efektiviĝos ĉirkaŭ bone sukcesos la menciitaj aranĝoj, okazontaj ĉirkaŭ la tempo de la apero de ĉi tiu numero de EL.

La 36-a IJK en 1980 okazis iom pli oriente ol la tujjara 65-a UK; tiuj estis en Raŭmo, respektive Stokholmo. Mi tiam pensis kaj eldiris la esperon, ke kiam sekvan fojon UK estos en Finnlando, junularo povu kongresi iom pli oriente (la Raŭma IJK estis la unua en la tiel nomata okcidento, kiun partoprenis granda grupo el Sovetunio). Efektiviĝis: En 1995, post la 80-a UK la 51-a IJK okazis en Serovo apud Peterburgo. Politikaj kondiĉoj funde kaj pozitive ŝanĝiĝis. La 67-a IJK en Kievo okazis iom pli oriente ol la 96-a UK de Kopenhago, ĉar la kondiĉoj daŭre pozitive ŝanĝiĝis. Nun ni troviĝas en serioza turnopunkto, kie lasi sin esti provokita kondukus al profundigo de la krizo.

La novaj membroj de Eŭropa Parlamento komencos sian mandaton ekde julio. EAF bondeziras al la Finlandaj MEP-oj *”sukceson en via grava laboro por internacia interkompreniĝo kaj kunlaboro, menestystä tärkeässä työssäne kansainvälisen sovun ja yhteistyön hyväksi, framgång i er viktiga uppgift för internationell förståelse och samarbete”*, ĉi-situacie kun aparta bonvolo kaj seriozo.

Tuomo Grundström

100 jaroj Tove Jansson, Muminlibro

Tre konata estas multloke en la mondo la finna pentristino kaj verkistino *Tove Jansson*, kies Muminlibroj disvastiĝis en ĉiujn direktojn: sudon, nordon, okcidenton kaj orienton. Oni publikigis ilin en 45 lingvoj. En *Naantali* apud *Turku* en Finnlando situas muminparko sur eta insulo. La japanoj volonte vagadas tie. Ili montras profundajn sciojn pri la tempo. Ofte mi gvidis grupetojn kaj unuopulojn japanajn en *Naantali*, en la eta havenurbo proksime al la somera rezidejo de la ŝtatrezidento de Finnlando.

Tove Jansson naskiĝis en Helsinko 1914 kaj mortis tie 2001. La patro estis skulptisto *Viktor Jansson*. Ŝia patrino *Signe Hammarsten*, karesnome inter la propraj infanoj *Ham*, venis el Stokholmo. Tre multflankan kaj riĉe ilustritan biografion verkis *Tuula Karjalainen*. La libro "Laboru kaj amu" aperis en 2013. La vivofazo de Tove estis fascinaj. Ŝi societumis kun multaj viroj, sed finfine venkis en ŝi sam-seksema trajto kaj ŝi vivis kune preskaŭ tridek jarojn kun la grafikistino *Tuulikki Pietilä*. Ilia somera paradizo estis tre malgranda roka kaj senarba insuleto *Haru* sur la Finna Golfo iom oriente de Helsinko.

Iel mirinde estas, ke la artista multflanka karioero de Tove Jansson malfermiĝis al mi nur dum tiu ĉi festojaro. Saĝuloj diras: pli bone malfrue

ol neniam. Ravis min ankaŭ eseoj ŝiaj: i.a. "Somera libro" kaj "Filiono de skulptisto". La tekstoj egale bone taŭgas kaj por infanoj kaj



Tove Jansson kun Muminfiguroj, 1956. Fotoj: Reino Loppinen, Wikicommons.

por plenkreskuloj. Iam post verkado Tove estis trista kaj tute deprimita, sed dankletero de juna knabeto tuj refreŝigis ŝin kaj ekvilibra animstato rapide revenis. Indas konstati, ke dum la okdekaj jaroj ŝi ricevis dankleterojn de infanoj dumil ekzemplerojn jare. Al ĉiuj ŝi persone kaj propramane dankis.

En Helsinko la Nacia Artgalerio havas ekspozicion pri Tove Jansson de marto ĝis septembro 2014. Mian atenton aparte kaptis olea pentraĵo de la jaro 1942 prezentanta la Jansson-familion. Tre abunda estas la ekspozicia materialo. Alia altira magneto estis lumbilda serio pri la dometo somera sur haru-insulo ekster la urbo *Porvoo* en la insularo de *Pellinge*.

Fine indas absolute mencii la verkon "Muminvalo" eldonitan 1984 en Esperanto (represo 1993). La libro originale aperis en la sveda sub la nomo "Det osynliga barnet och andra berättelser" (La Nevidebla infano kaj aliaj rakontoj). Flue kuras la traduko de *Eckhard Bick*. Estis interese kompari esprimmanierojn en kvar lingvoj – svede, finne, angle kaj esperante. Nur unu tiklan tradukeron mi mencias: En la sveda originalo Tove Jansson uzas la vorton "löständer" kaj la finna tradukistino elektis la esprimon "irtohampaat" anstataŭ la nune ĝenerale uzata varianta "tekehampaat". Tiaj detaloj estas bagatelaj sed iel amuzaj. Vi certe konas la latinan proverbon "Errare humanum est".

Forte allogis min la vivo, arto kaj vortoj de Tove Jansson. Kompreneble mi vizitis la menciitan ĉefurban ekspozicion kaj la hejmdomajn adresojn de la artistino ĉe *Luotsikatu 4 B, Ullanlinnankatu 1* kaj *Apollonkatu 13*. Neniel mi pentis la longan tagon, tamen iom lacigan, oferitan tiucele. Se la tempo ne permesas vojaĝon al Helsinko, nepre legu la du brilajn biografiojn verkitaĵojn de *Boel Westin* kaj *Tuula Karjalainen*. Surprizigajn aventurojn kun Tove Jansson deziras entuziasmo en *Turku*.

Jorma Ahomäki
Aprilo 2014

Lingvaj eroj kolektitaj dum vivolonga itinero

Jam antaŭ kvindek jaroj profesoro *Kalevi Wiik* en la Universitato de Turku ĵetis en mian animon fruktodonajn semojn por kulturi lingvan terenon. Tiutempe tre enigmaj al mi estis la terminoj morfemo kaj fonemo. Iom post iom malfermiĝis pere de ili fascina nova mondo sur skriba kaj prononca esprimado. Ankoraŭ hodiaŭ daŭras leĝera plugado de la menciitaj kampoj.

Sekvis novaj vojmontruloj. La britaj fonetikistoj *Daniel Jones* kaj *J.C. Wells* klarigis la gravan signifon de voĉaj kaj senvoĉaj sonoj. La pluralaj vortformoj *cats* (t kaj s ambaŭ senvoĉaj) kaj *dogs* (g kaj s ambaŭ voĉaj) esprimas la diferencon de sonvariado. Detala fonetiko instruas kiel ĝuste uzila koncernan lingvon. Afrikatoj donis al mi en la komenca studperiodo grizajn harojn, kvankam ili estis komprenataj inter finnoj kiel vico de du sinsekvaj konsonantoj – ekzemple ts. En iuj lingvoj iliaj parolantoj interpretas vicon de du konsonantoj kiel unu sonon. Estas nun argumentita kialo suriri la lingvan itineron de profesoro *Arto Mustajoki*, kiu estras la katedron de la rusa lingvo en la Universitato de Helsinki. Lia relative nova, tre altira verko nomiĝas "Leĝera tuŝeto al la rusa lingvo" (*Kevyt kosketus venäjän kieleen*).

Tiu libro estas utila al plenaj nesciantoj pri la temo kaj ĝi taŭgas ankaŭ por spertaj studentoj.

Tikla demando ofte estas en la rusa lingvo la s-sonoj. Mustajoki tute facile digesteble klarigas tiujn entute 7 diversajn sonojn. Por esperantistoj oni povas listigi ilin jene: 1. s (с), 2. z (з), 3. ŝ (ш), 4. ĵ (ж), 5. ĉ (ч), 6. c (ц), 7. ŝŝ (щ). Facile ĉiuj rimarkas, ke la kvar unuaj estas samaj kiel en la angla lingvo, la kvina kaj la sesa estas afrikatoj kaj fine la sepa estas la t.n. "brasiksupa"-s. Por plena laiko la libro donas ĝuindajn momentojn, kiujn la leganto volonte ripetos. Indas aĉeti aŭ prunti la majstroverkon de Arto Mustajoki.

Agrablan surprizon donis la freŝa blogaĵo (19.5.2014 – <http://blogs.helsinki.fi/mustajoki/>) de Arto Mustajoki pri la lingva situacio en Belorusio. En la lando oni parolas la miksitan lingvon "trasjanka". La vortaro estas ĉefe el la rusa lingvo kaj la gramatiko el la belorusa aŭ el ambaŭ. Forte mi rekomendas la skribaĵon de prof. Mustajoki "Valko-Venäjä on erikoinen maa myös kielellisesti". (Belorusio estas speciala lando ankaŭ el la lingva vidpunkto). Kompreneble 82-jara grandavo kontentas pro la entuziasmo, kiu feliĉe iam kaj tiam ankoraŭ ekestas koncerne lingvistikajn bagatelaĵojn. *Mika Waltari* parolis pri belaj vanaĵoj.

Jorma Ahomäki

Eventokalendaro – Tulevia tapahtumia 2014

- 28.6.–4.7. La 50-a BET en Jūrmala-Bulduri (loko ŝanĝiĝis), Latvio (<http://esperanto.lv>)
- 6.–12.7. La 10-a Eŭropa Esperanto-Kongreso en Rijeka, Kroatio (<http://eeu-kongreso.webnode.com/>)
- 12.7.–20.7. SES-2014 kaj TEVA-kongreso en Nitra, Slovakio (<http://ses.ikso.net/>)
- 14.–18.7. Somera kurso en Orivesi, (vidu artikolojn en ĉi tiu numero)
- 18.–25.7. La 70-a IJK en Fortaleza, Brazilo (<http://ijk.brazilo.net/>)
- 26.7.–2.8. La 99-a UK en Bonaero (Buenos Aires), Argentino (http://www.uea.org/kongresoj/uk_2014.html)
- 23.–30.8. La 81-a Itala kongreso, Fai de la Paganella (Trento), Italio (<http://kongreso.esperanto.it/81/>)
- 6.–7.9. Aŭtunaj Tagoj de EAF en Iisalmi

Literatura konkurso



La itala eldonejo "Edizioni Haiku" [Hajkaj Eldonoj] lanĉis literaturan konkurson por esperantlingvaj verkistoj.

Interese estas, ke la eldonejo ne estas esperantista, sed decidis ĝin organizi. Do ni devas

nepre montri, ke Esperantujo estas fekunda niĉo de literaturistoj.

Bonvolu partopreni plurnombre, certe multaj el vi havas en sia tirkesto ion taŭgan.

Ĉi sube vi trovos la ligan por legi la detalojn de la konkurso www.edizionihaiku.com/eventi-e-news/item/171-literatura-konkurso-rakontoj-de-la-tuta-mondo.

Dankon,

Michela Lipari

michela.lipari@tiscali.it



Kiu rajtas partopreni?

Ĉiuj personoj, de iu ajn nacieco.

Lingvoj de la rakontoj

La rakontoj estos akceptitaj nur en Esperanto. Ĉi tiu lingvo naskiĝas kiel ponto inter ĉiuj landoj de la mondo, kaj respektas la kulturen kaj lingvan heredaĵon en la nomo de la egaleco inter la popoloj. Ene de ĉi tiu projekto de tutmonda paco, *Edizioni Haiku* celas antaŭenigi antologion de rakontoj kiuj estas omaĝo al la ideoj kaj la verkoj de Ludoviko Lazaro Zamenhofo, patro de Esperanto. La konkurso turnas sin al la milionoj de esperantistoj en la mondo, kiel projekto por kunpartigi rakontojn, fantaziojn kaj spertojn pri reciproka kompreno je tutmonda skalo.

Kiamaniere oni petas partopreni?

Ĉiu aŭtoro povas partopreni al la konkurso per maksimume tri rakontoj, post la pago de 3,00 EUR. Ne estas minimuma longeco, sed la maksimuma permesita longeco estas tri dosierujoj (dosierujo estas dokumento, kiu havas 30 liniojn da teksto, totala nombro 1 800 – 2 000 signoj). Ĉiuj partoprenantoj - gajnintoj kaj ne - ricevos senpagan ekzempleron de la elektronika libro "Rakontoj de la tuta mondo" kun la rakontoj

de la gajnintoj. La rakontoj devas esti senditaj al la retroŝta adreso konkurso@edizionihaiku.com ĝis la 30a septembro 2014.

Kotizo

La kotizo de 3,00 EUR por ĉiu aŭtoro (kaj ne por ĉiu sendita rakonto) estas konsiderata kiel simbola gesto por la kolektiva realigo de ĉi tiu projekto. La kotizopago povas esti farita per *PayPal* (www.paypal.com) al la retroŝta adreso konkurso@edizionihaiku.com kun la celo "partecipazione al concorso - Nomo kaj Familia Nomo de la aŭtoro". La redaktejo de Edizioni Haiku katalogos la rakontojn de ĉiuj partoprenantoj.

Premioj

El ĉiuj rakontoj Edizioni Haiku selektos 30 rakontojn, kiuj estos publikigitaj en la antologio. El tiuj 30 rakontoj estos elektitaj tri absolutaj gajnintoj, kiuj ricevos kvin kopiojn de la papera libro.

La juĝantaro

La juĝantaro konsistas el esperantistoj, verkistoj, ĵurnalistoj, tradukistoj kaj la redaktejo de Edizioni Haiku. La elekto de la verkoj estas neapelaciebla.

ALIĜFORMULARO "Literatura Konkurso: rakontoj de la tuta mondo"

Kara aŭtoro, per ĉi tiu formularo vi akceptas la jenajn regularon kaj la partoprenmanierojn, vi deklaras, ke via verko estas via kreaĵo kaj vi posedas ĉiujn ĝiajn rajtojn, krome vi akceptas la traktadon de viaj personaj elementoj, laŭ la reguloj antaŭfiksita de la leĝdona dekreto 169/03 de la itala Respubliko kaj ekde nun vi permesas la eventualan publikigon de via verko.

Bonvolu pleniĝi la sekvan formularon kaj sendi ĝin per e-poŝto, kun ĉiu rakonto anekse.

Pseŭdonimo: _____

Persona nomo: _____

Familia Nomo: _____

Naskiĝdato: _____

Adreso: _____

Urbo: _____

Lando: _____

Retadreso: _____

Titolo de via verko: _____

Subskribo: _____

Esperanto-Televido "ETV" en Aŭstralio – ekde la 5-a de aprilo!

Oficiala lanĉo de la interreta Esperanto-Televido "ETV" okazis en Sidnejo, sabaton la 5-an de aprilo 2014!

La unua elsendo de ETV – kun tri-hora programo – okazis je 07:00 GMT, do en Nov-Jorko je 02:00 ĝis Sidnejo 17:00.

Kompreneble post tiu unua ETV-elsendo oni povas spekti la programon senĉese, eĉ du horan novan programon ĉiusemajne!

La nova televid-kanalo estas elsendita per alt-rapida interreto kun IPTV-teknologio, ebliganta bildo-larĝon kun 1080 pikseloj (bilderoj, bildopunktoj). Ĝi estos disponebla tutmonde per ĉiuj iloj, kiuj havas alt-rapidan interretan konekton: televidiloj, tablaj kaj tabul-komputiloj, telefonoj kun androjdo aŭ iOS, ktp.

La enhavo estas plejparte en Esperanto, kaj konsistas el originalaj aŭ dublitaj unikaj kaj allogaj programoj, kaj ankaŭ "zorge elektitaj filmetoj kreitaj de kontribuantoj ĉirkaŭ la mondo."

La nova elsenda kanalo "Esperanto TV" laŭplane celas liveri allogan enhavon al ĉiuj niveloj de parolantoj de Esperanto, de komencantoj ĝis fluparolantoj. Kelkaj programoj estas ankaŭ en aliaj lingvoj, kiel ekz-e lingvaj kursoj por anglalingvanoj.

"Esperanto TV" estas rezulto de kunlaboro inter la sidnej-baza *Language Festival Association* (Asocio de Lingvaj Festivaloj) kaj la aŭstralia amaskomunika kompanio *iStreamStudios*.

La teamo malantaŭ ETV:

1. *Richard Delamore* (ĉefo de produktado, re-daktoro)
2. *Marina Lobanova* (merkatikaj aferoj)
3. *Dmitry Lushnikov* (partnera produktisto)
4. *Smoliakov Roman* (filmado)
5. *Robert Poort* (oficiala reprezentanto)

Centraj adresoj:

1. info@esperantotv.net
2. esperantotv.net/
3. Informriĉa paĝo pri la projekto de Aŭstralio ETV: <https://www.facebook.com/LaEsperantoTV>
4. Informoj, komunikaĵoj, kaj materialoj pri kunlaboro: www.actinggaustralia.com.au
5. Retejo de la firmao kun la elsendoj: www.istreamstudios.tv

laŭ *Szilvási László*
Ret-Info / Lingvo-Studio, LS

Somera Esperantokurso alproksimiĝas



Estu la ora reĝo de via vivo, konsilas *Purnu* (*Aamulehti*, 20.5.) En la artcentro Purnu ni vidos kiel per la arto oni montros tion. Estu la ora reĝo de via vivo kaj elektu somerkurson en Orivesi-instituto **14.–18.7.2014**, kiam Esperanto estos uzata en studado kaj ĝuado. Se ni estos vere sukcesaj, ni ricevos krom la litovan instruiston *Gražina Opulskienė* kursanon ankaŭ el Afriko el Malavio, kun kiuj ni ”devas” uzi Esperanton. Gražina scias kion la inicianto de Esperanto L.L. Zamenhof faris en Litovio. Estos interese aŭdi pri la vivo kaj Esperantoagado en tiu por ni malproksima kontinento, kie ĝi estas forte vastiĝanta.

Pri la Esperantokurso estas pli multe skribita en la antaŭaj numeroj de Esperantolehti, kaj en la paĝaro www.esperanto.fi, kie vi trovos ĉiujn sciojn pri ĝi. Sube estas nur kernaj aferoj. Vi povas rekte demandi de la kursestro Sylvia.

Prezo 420 EUR, en 2-pers. ĉ. + manĝoj + instruado + programo. Aparta pago pro la ekskurso.

▲ En la preĝejo.

► En la hejmgregiona muzeo.

Fotoj: la aŭtoro

Rim.! Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj donos du stipendiojn po 50 EUR por sub 30-jaruloj. Petu de la subskribinto.

Komenco en lu 14.7. je la 11.30 per lunĉo, fino en ve 18.7. per posttagmeza kafo ĉ. je la 13.30.

Aliĝofino 27.6.2014

Aliĝo al Oriveden Opisto www.orivedenopisto.fi.

orivedenopisto@kvs.fi, Koulutie 5, 35300

Orivesi, tel. 020 7511 511

Bonvenon!

Sylvia Hämäläinen, kursestro

sylvia.h@kolumbus.fi, tel. 050 321 4313,

F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere

Esperanton kesäkurssi lähestyy

Ole oman elämäsi kultainen kuningas, Purnu opastaa (*Aamulehti* 20.5.). Vierailullamme Purnun taidekeskuksessa näemme miten tämän asian voi osoittaa taiteen keinon. Ole oman elämäsi kultainen kuningas ja valitse kesäkurssi Oriveden Opistossa **14.–18.7.2014**, jolloin siellä käytetään esperanton kieltä opiskellen ja viihtyen. Jos meitä oikein onnistaa, saamme

liettualaisen opettajan *Gražina Opulskienė* lisäksi kurssilaisen Afrikasta Malawista, joiden kanssa on ”pakko” puhua esperantoa. Gražina tietää mitä tekemistä esperanton laatijalla L.L. Zamenhofilla oli Liettuassa. On kiintoisaa kuulla elämästä ja esperantotoiminnasta kaukaisessa maanosassa, jossa se on voimakkaasti lisääntymässä.

Kesäkurssista on kerrottu tarkemmin tämän vuoden Esperantolehdistä, ja ne löytyvät www.esperanto.fi -sivustolta. Tässä on nyt vain ydin-kohtia. Voit kysyä lisää suoraan kurssin johtajalta Sylvialta.

Hinta 420 EUR, täysihoito 2 hh + opetus + ohjelma. Retki maksetaan erikseen.

Huom! Suomen opettajien esperantoyhdistys suo kaksi 50 euron stipendiä alle 30-vuotiaille. Ano allekirjoittaneelta.

Kurssi alkaa ma 14.7. klo 11.30 lounaalla,

päätyy pe 18.7. iltapäiväkahviin n. klo 13.30.

Ilmoittautumisen eräpäivä on 27.6.2014.

Ilmoittaudu Oriveden Opistoon www.orivedenopisto.fi, orivedenopisto@kvs.fi, Koulutie 5, 35300 Orivesi, puh. 020 7511 511

Tervetuloa!

Sylvia Hämäläinen, kurssin johtaja
sylvia.h@kolumbus.fi, puh 050 321 4313,
F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere

Stipendejä jaossa

Suomen opettajien esperantoyhdistys jakaa kaksi 50 euron stipendiä alle 30-vuotiaille opiskelijoille Esperanton kesäkurssille Orivedellä 14.–18.7.2014. Lähetä anomuksesi Sylvia Hämäläiselle 27.6.2014 mennessä.

Sylvia Hämäläinen, ELFI: puheenjohtaja
sylvia.h@kolumbus.fi
F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 TAMPERE

Stipendioj haveblaj

Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj ofertas du stipendiojn po 50 EUR por studentoj sub 30 jaroj por la Somera Esperantokurso 14.–18.7.2014. Bonvolu sendi vian peticion al Sylvia Hämäläinen ĝis 27.6.2014.

Sylvia Hämäläinen, prezidanto de ELFI
sylvia.h@kolumbus.fi
F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 TAMPERE

ISAE senpage disponigas pli ol 60 jarojn se dia revuo

Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE) ĵus havebligis en Interreto ampleksan arkivon de sia periodaĵo "Scienca Revuo". Ĉirkaŭ 2000 artikoloj el la periodo 1949–2014 estas nun legeblaj en PDF-formato, skanitaj kunlabore inter ISAE kaj Interkultura Centro Herzberg (www.ic-herzberg.de). Serĉilo ebligas trovi artikolojn, ekzemple, laŭ verkinto aŭ titolo. La senpage alirebla arkivo troviĝas ĉe <https://scienca-revuo.info/issue/archive>.

Scienca Revuo estas grava kaj tradicia periodaĵo en Esperanto. Ĝi aperas ekde 1949 kaj estas daŭrigo de Internacia Scienca Revuo, fondita en 1904. Krom publikigi sciencajn artikolojn el ĉiaj fakoj ĝi havas ankaŭ sekciojn pri

terminologio, pri scienco kaj socio, kaj pri la rilato inter scienco kaj Esperanto.

ISAE fondiĝis en 1906 kiel la unua esperantolingva asocio de fakuloj el ĉiuj sciencaj kampoj kaj interesatoj pri sciencaj aferoj. Ĝi estas aliĝinta al UEA kaj ekde 2013 oficiale registrita kiel asocio ĉe la Komerca Ĉambro de Roterdamo.

ISAE daŭre serĉas verkantojn kaj provlegantojn por diversaj fakoj. Kiu emas fake verki aŭ alie subteni la scienca agadon de la asocio bv. viziti la paĝon: <https://scienca-revuo.info/about/journalSponsorship>.

(Laŭ komunikado de la estraro de ISAE)
[laŭ GK 541]

Aŭtunaj Tagoj – Syyspäivät

6.–7.9.2014

Kunvenejo: Hotelo Seurahuone, Savonkatu 24, Iisalmi
Temo/aihe: **Naturo kaj kulturo Luontoa ja kulttuuria**

Programo – Ohjelma (ŝanĝoj eblas – muutokset mahdollisia)

SABATO / LAUANTAI, 6.9.2014

7.00 (ekde) Matenmanĝo. *Aamiainen.*

9.30–11.00 Ekiro de hotelo Seurahuone al rondirado en Iisalmi: akvoturo, lagobordo, la plej malgranda trinkejo de la mondo. *Kävely Iisalmen keskustassa, lähtö Seurahuoneelta: vesitorni, järvenranta, maailman pienin ravintola Kuappi.*

11.30–12.00 Malfermo de la tagoj. Libroservo malfermita. Presentado de Esperanto en Seurahuone. *Päivien avaus. Kirjamyyntipalvelu ja esperanton esittely Seurahuoneella.*

12.00–13.30 Lunĉo. *Lounas.*

13.30–14.30 Prelego de Reino Eriksson pri fabeloj de Eero (Ii) Salmelainen. *Reino Erikssonin esitelmä Eero (Ii) Salmelaisen saduista.*

14.30–18.00 Ekskurso al Sonkajärvi: akvomuelilo, muzeo de subĉiela mino Jyrkkä ktp. Kafo kaj gustumado de Esperanto-kolbaso. *Retki Sonkajärven maisemiin: toimiva mylly, Jyrkän ruukkimuseo ym. kahvit ja esperantomakkaran maistelua.*

18.00–19.30 Paŭzo post alveno al la hotelo Seurahuone. *Tauko hotellille pahuun jälkeen.*

19.30– Komuna vesperumo kun koncerto de Asorti. Vespermanĝo en la restoracio de Seurahuone. *Yhteinen illanvietto ja Asortin konsertti. Illallinen rav. Seurahuoneella.*

Dimanĉo / Sunnuntai, 7.9.2014

8.00–9.30 Matenmanĝo. *Aamiainen.*

9.30–10.30 Prelego de Olli Pajula: Vivo en la universo. *Olli Pajulan luento: Universumin elämää (esperantoksi).*

10.30–11.00 Libroservo. *Kirjapalvelu.*

11.00–15.00 Kultura rondveturo, dumvoje lunĉo. Gvidado finne de loka ĉiĉerono Ilkka Kauppinen kaj esperante de Reino Eriksson. Atelieroj de la skulptistoj Erkki Rytkönen (lignaĵoj) kaj Anu Matilainen, pejzaĝoj de Juhani Aho kaj lia fiŝkapteja ŝtoneto. *Kulttuurikiertoajelu, suomen- ja esperantokieliset opastukset. Erkki Rytkösen puunveistosateljee, Juhani Ahon maisemat Mansikkaniemellä ja onkikivi, lounas kahvila-ravintolassa Itäläpölyssä, kuvanveistäjä Anu Matilaisen artejeto.*

15.00–15.30 Fermo de la tagoj kaj en Iisalmi en restoracio kaj kulturejo Artos. *Päivien päätös ja kahvit Iisalmessa ravintola Artoksessa, lyhyt tutustuminen KulttuuriArtokseen.*

Bonan hejmvvojaĝon! *Hyvää kotimatkaa!*



La plej malgranda trinkejo de la mondo.

Aŭtunaj Tagoj 2014

Ĉu vi jam aliĝis al Aŭtunaj Tagoj en Iisalmi? Se ne, notu ke la unua limdato estas la 15-a de julio. Multflanka programo atendas vin, eĉ eblos aŭskulti kaj renkontiĝi kun unu el la elstaraj Esperanto-ensambloj: *Asorti* el Litovio. La programaj detaloj estas priskribitaj en Esperantolehti 2/2014 kaj ankaŭ en nia retpaĝo www.esperanto.fi. Eblaj ŝanĝoj aperos tie.

Tranoktejoj kaj manĝoj

La ĉefa tranoktejo estas la hotelo Seurahuone. Ĉe bienejo de Onni Kauppinen troviĝas **amasloĝejo**.

Informu kaj informiĝu ĉe kontaktuloj, se vi deziras alian ĉambron ol la 2-litan informita en la paketo. Ni manĝos kaj en Seurahuone kaj en manĝejoj dumvoje de ekskursoj. Memoru sciigi al ni pri viaj eblaj specialaj dietoj.

Eventoj antaŭ kaj post la AT

Iisalmi-klubanoj kun la prezidanto Onni Kauppinen aranĝos programon por tiuj, kiuj deziras kaj povas resti pli longe en la regiono. Se vi alvenos vendrede, estos programo en la bieno de Onni jam ekde la 14-a, tuj post la alveno de la trajno el la sudo. Dimanĉvespere estos en programo ia. plia koncerto de Asorti. Informiĝu ĉe Onni.

Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinko aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson eafmendoj@esperanto.fi. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron 4640. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke ni organizantoj sciu, kiu volas kion dum la AT.

Kun eventualaj demandoj vi povas turni vin al la sekretario de EAF, Tiina Oittinen, kaj al Onni Kauppinen en la Esperantoklubo de Iisalmi



ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF
5.–7.9.2014 en Iisalmi.

Nomo: _____

Adreso: _____

Telefono (portebla): _____

Ret-adreso: _____

Aliĝkotizo:

20 EUR ĝis 15.7.2014 _____
25 EUR poste _____
Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo.

AT-PAKETO 1 kun tranoktado en hotelo Seurahuone
(inkl. 2 noktojn en 2-lita ĉambro, 2 lunĉojn,
vespermanĝon kaj kafojn) **145 EUR:** _____

AT-PAKETO 2 kun tranoktado en amasloĝejo
(inkl. 2 noktojn, 2 lunĉojn, vespermanĝon kaj kafojn)
90 EUR: _____

AT-PAKETO 3 sen tranoktado (inkl. 2 lunĉojn,
vespermanĝon kaj kafojn) **50 EUR:** _____

Entute pagenda al la konto de EAF: _____

Pagoj al la konto:

FI11 8000 1700 2308 25

Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640** (ne skribu aliajn informojn en la pagilo)

Pliaj informoj aŭ deziroj aŭ demandoj
(eblas sendi rekte al kontaktuloj): _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando,
Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinko
Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

BONVENON!



mi. La kasisto de EAF, Tiina Kosunen, prizorgas pri la aliĝiloj kaj pagoj. Kontaktinformoj de la sekretario kaj kasisto de EAF estas sur paĝo 2. Onni Kauppinen estas plej rapide kontaktebla per telefono +358 500-813530.

Syyspäivät 2014

Syyspäivät ovat tänä vuonna Iisalmessa kuten edellisessä Esperantolehdestä kerrottiin. Jos et vielä ole ilmoittautunut, ehdit hyvin, sillä ensimmäinen maksupäivä on 15.7. Ohjelma on iisalmelaiseen tapaan monipuolinen ja kiinnostava: tutustumme sekä kaupunkiin että lähiseutuun ja muistellemme mm. Eukonkantoa, kuulemme mielenkiintoisia luentoja niin tästä kuin muistakin maailmoista. Ja lauantai-iltana meitä viihdyttää korkeatasoinen esperanto-musiikkiyhtye **Asorti** Liettuasta. Ohjelman yksityiskohtia voit lukea Esperantolehdestä 2/2014 sekä nettisivuiltamme www.esperanto.fi. Yhteyshenkilöt vastaavat mielellään kysymyksiisi.

Majoitukset ja ruokailu

Yöpyminen joko hotelli Seurahuoneella 1–4 hengen huoneissa tai yhteismajoituksessa Onni Kauppisen maatilalla. Lauantain ruokailut ovat Seurahuoneella, sunnuntaina lounas retken yhteydessä ja päätöskahvit ravintola Artoksessa. Samalla tutustumme lyhesti KulttuuriArtokseen (ent. Evakkokeskus).

Ennen ja jälkeen syyspäiväviikonlopun

Tule Iisalmeen jo perjantaina ja pääse mukaan Onnin maatilalle nauttimaan muurinpohjajalettuja ja tapaamaan Asorti-yhtyeen jäseniä. Sunnuntai-iltana Asorti konsertoi kylällä. Voit jäädä Iisalmeen pitemmäksikin aikaa. Lisätietoja Onnilta.

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä lomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi sekä maksa osallistumismaksu liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa 4640,

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 5.–7.9.2014 Iisalmessa.

Nimi: _____

Osoite: _____

Puhelin: _____

Sähköposti: _____

Ilmoittautumismaksu:

20 EUR 15.7.2014 asti _____

25 EUR 15.7.2014 jälkeen _____

AT-PAKETTI 1 yöpyminen hotelli Seurahuoneella (sis. 2 yötä 2-h huoneessa, 2 lounasta, illallisen ja kahvit) **145 EUR:** _____

AT-PAKETTI 2 yöpyminen yhteismajoituksessa (sis. 2 yötä, 2 lounasta, illallisen ja kahvit) **90 EUR:** _____

AT-PAKETTI 3 ilman yöpymistä (sis. 2 lounasta, illallisen ja kahvit) **50 EUR:** _____

Maksut yhteensä

Suomen Esperantoliiton tilille: _____

Tilinumero: FI11 8000 1700 2308 25

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja, toivomuksia ja/tai kysymyksiä (voit lähettää myös suoraan yhteyshenkilöille): _____

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto,
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!



jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös tiedot siitä, mihin olet tulossa mukaan.

Erilaisiin tiedusteluihin vastaavat liiton sihteerit Tiina Oittinen ja Iisalmen Esperantoklubin puheenjohtaja Onni Kauppinen. Liiton rahas-

tonhoitaja Tiina Kosunen huolehtii maksujen kirjaamisesta ja kokoaa ilmoittautumistiedot. Suomen Esperantoliiton sihteerin ja rahastonhoitajan yhteystiedot ovat lehden sivulla 2. Onni Kauppisen tavoittaa parhaiten puhelinnumerosta 0500-813530.

Trastui

Kun Lahden Esperanto-kerho täytti 20 vuotta, saimme järjestettäväksi Suomen Esperantoliiton syyspäivät. Samassa yhteydessä päättimme juhlia kerhonne merkkitapahtumaa. Kutsuimme vieraita Lahden ystävyyskaupungeista Ruotsin Västeråsin, Unkarin Pécsin, silloisen Neuvostoliiton Saporozjen esperantokerhoista ja vielä Puolan Gdanskin seudun esperantoyhdistyksestä, vaikka Gdansk ei olekaan Lahden kummikaupunki. Koska epäilimme suuresti, ettei neuvostoliittolaiset saa lupaa matkustaa otimme ennakkoon yhteyttä Lahden virkamiehiin, joiden tiesimme suunnittelevan vierailua Saporozjiin, ja pyysimme heitä vaikuttamaan asiaan.

Suuri oli yllätyksemme, kun saimme tiedon, että neljä henkilöä kustakin esperantokerhosta lupasi tulla, myös itänaapurista. Ruotsalaiset tulivat omalla autolla, muut junalla. Asemalla odottelimme junaa jännittyneinä. Kohtaaminen oli ikimuistettava. Neuvostoliitosta tuli kaksi naista ja kaksi miestä. Suurin osa vieraista asui kerhonne jäsenten luona. Kaksi miestä itänaapurista asui reilun viikon kodissani. Aina kun tuli vapaa-aikaa muusta ohjelmasta, kaverit kiertelivät kaupungin tavarataloissa ja tutkivat, mitä on tarjolla mahdollisimman edullisesti. Lopullisen ostopäätöksen he tekivät vasta viimeisenä päivänä. Aluksi olin mukana mutta



sitten vein heidät aamulla keskustaan ja palasin kotiin. Jossain iltapäivällä hain heidät sovitusta paikasta. Viimeistä edellisenä vierailupäivänä he pyysivät minua mukaansa tulkiksi. Jo matkalla keskustaan huomasin, että jokin painoi heidän mieltään. Kun parkkeerasimme auton, asia purkautui:

– Esa, sano nyt ihan rehellisesti, erotummeko me muista ihmisistä katukuvassa.

En ollut vähääkään miettinyt tuollaista asiaa. Minusta he olivat siististi pukeutuneita ystäviämme. Niinpä sen enempiä miettimättä sanoin, etteivät he minusta erotu muista ihmisistä. He olivat oli silminnähdyn tyytyväisiä. Lähdimme kolmistaan kävelemään kohti keskustaa. Pian vastaan tuli neljä pojannappulaa. Juuri kun he olivat kohdallamme, kuului kirkkaalla pojanäänellä: – *Trastui, trastui.*

Esa Lång

Mumin-figuroj



Hatifnatoj. Foto: RB.

Jen kelkaj nomoj de mumin-estaĵoj en diversaj lingvoj. La libroj ja estas tradukitaj en kvindekon da lingvoj, kaj ne ĉiam facilas al la tradukanto scii, kian nomon uzi. Unuj nomoj, kia **Mumintrolo**, *Moumine* france kaj

Moomintroll angle, *Mumin* germane, *Muumipeikko* finne, estas klare kompreneblaj. La origina sveda nomo ja estas *Mumintrollet*. Nia finna *Niiskuneiti* nomiĝas *Snorkfröken* svede, *Snorkmaiden* angle, *Tusklikupreili* estone, *Panna Migotka* pole kaj **Snorkfraŭlino** Esperante.

Al nia finna *Nuuska*, la verde vestita muzikema vagabondo, oni donis la nomojn *Snusmumriken* (sveda), *Snufkin* (angla) kaj **Snufmumriko** (Esperanta). Granda diferenco rimarkeblas en la itala nomo kaj alilingvaj nomoj de **hatifnatoj** (finne *hattivatit*). Italaj legantoj konas ilin kiel "fungarelli"! Same la nomoj de *Tuhti ja Viuhti* surprizas: angle *Thingummy and Bob*, svede *Tofslan och Vifslan*. Kaj kiel nomiĝas la timiga, frostiga *Mörkö?* - *Måraran* svede, *The Groke* angle. Pri ĉio tio vi trovos multon ĉe www.moomin.com/en/characters (angle). Vidu ankaŭ www.tove100.fi kaj vi komprenos, kiel vaste oni solenas en la jubilea jaro de T. Jansson.

Saliko

Cetere: la bela libreto "Muminvalo" ankoraŭ aĉeteblas kontraŭ 12 EUR ĉe la libro servo de EAF (eaf@esperanto.fi), iom pli ĉe UEA (katalogo.uea.org).

Roy McCoy nova komisiito pri Pasporta Servo

En sia aprila kunsido en Norda Italio, la Estraro de TEJO nomumis Roy McCoy kiel Komisiiton pri Pasporta Servo. McCoy emeritiĝis pasintdecembre kiel longtempa redaktoro de la Jarlibro kaj prespretigisto de aliaj eldonaĵoj en la Centra Oficejo de UEA. Li pretigis por presado interalie la lastajn du adresarojn de Pasporta Servo (2010 kaj 2011). McCoy akceptis la taskon kun la kondiĉo ne esti ligita al antaŭe fiksitaj limdatoj. Celo estas eldoni novan numeron ekde ja-

nuaro 2015, ne plu sufiĉos por ĉi-tiu jaro.

Ankaŭ plena refunkciigo de la reta Pasporta Servo estas esperata relative baldaŭ. Volontulo estas serĉata por la kreado de mapoj, dum la landaj PS-organizantoj estos enplektitaj en la pridatenaj laboroj.

Roy McCoy estas kontaktabla ĉe *roymccoy.nl@gmail.com*.

[laŭ GK 542]

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki_jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantoklubi / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu_aini.esp@hotmail.com
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. www.esperanto.fi/tampere (Jukka Laaksonen: jvaletokolumbus.fi ☎ 050 5829 248)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 5494709
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 steleto@pp.inet.fi
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 EUR tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 EUR sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg-seuran jäsenmaksu on 44 EUR. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). esperanto@phnet.fi.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä. Lisätietoja: Jorma Toropainen, puh. 040 7510535, s-posti jormato35@gmail.com.

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2014

Nro	Limdato	Aperas
4/2014	1.9.	en septembro
5/2014	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 EUR	1/1 sivu/paĝo 50 EUR
1/2 sivua/paĝo 60 EUR	1/2 sivua/paĝo 30 EUR
1/4 sivua/paĝo 40 EUR	1/4 sivua/paĝo 20 EUR

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktoje: eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Esperanto-societo en Turku informas

Esperanto-societo en Turku bonvenigas gastojn ankaŭ tiun ĉi someron. Ni renkontiĝas pli-malpli regule merkrede en la biblioteka kafejo *Sirius*, adreso Linnankatu 2, inter la 16.30 kaj 17.30. Nature ni pretas vidi gastojn ankaŭ en aliaj tempoj. Informiĝu ĉe EST-anoj, kontaktuloj estas Tiina Oittinen (*tiina.oittinen@pp.inet.fi*, tel. 050-5494 709) kaj Leena Tiusanen (*leena.tiusanen@elisaneet.fi*, tel. 050-5757 956).

*Turun Esperanto-yhdistys toivottaa vieraat tervetulleiksi myös tänä kesänä. Tapaamme enemmän tai vähemmän säännöllisesti keskiviikkoisin Turun kaupunginkirjaston kahvila Sirkuksessa, Linnankatu 2, kello 16.30 ja 17.30 välillä. Ja toki vierailulle voi tulla muinakin aikoina. Ota yhteyttä ja varmista tapaaminen, yhteyshenkilöt ovat Tiina Oittinen (*tiina.oittinen@pp.inet.fi*, puh. 050-5494 709) kaj Leena Tiusanen (*leena.tiusanen@elisaneet.fi*, puh. 050-5757 956).*



Esperanto-societo Antaŭen informas

Someraj renkontiĝoj okazas en la kafejo de la ĉefbiblioteko "Metso" en Tampere lunde je la 17-18 (ĝis la 25-a de aŭgusto). – Bonvenon!

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy syyskuussa. Aineisto 31.8.2014 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en septembro. Artikoloj ĝis 31.8.2014 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <efgazeto@esperanto.fi>.